




JUNIO 2014



La « Espéranto-Gironde » Informilo

N° 140

Ĝuu viajn feriojn...

Kaj ne maltrafu la oktobran kantostaĝon

Esperanto-Gironde

LA KOMPANOJ INVITAS VIN AL
KANZONO-STAĜO



Maison Promotion
Sociale Artigues-près-
Bordeaux

Sabaton 11an kaj
dimanĉon 12an de
oktobro 2014

MIGUEL ÁNGEL GONZÁLEZ ĈE ESPERANTO GIRONDE

Okaze de la turneo de kubano Miguel Ángel González en Francio, organizata de Espéranto-France, pluraj anoj de Espéranto-Gironde havis la okazon gastigi Miguel-on.



EN GUJAN-MESTRAS

Sabaton, la 31an de Majo.

En Gujan-Mestras-stacidomo estas la 9a kaj kvarono, kiam la trajno alvenas kaj haltas. El la trajno viro jake vestita kun dorsosako eltiras unu, du, kaj fine tri valizojn, feliĉe ruleblajn. Herminia kaj mi akceptas Miguel-on.

Kun Elvezio, ni vizitas Pedron, la prezidanton de nia asocio, kiu estas kontenta koni Miguel-on, kaj ankaŭ Elvezion. Poste ni alvenas hejme, kie ni gastigas lin. Ni prezentas la golfeton sur la mapo, poste ni veturas al la havenoj de Gujan-Mestras.

Tiu ĉi tago estas por la Golfeto la tago de «Havenoj kaj vilaĝoj malfermitaj». Multaj bluaj bicikloj promenas ĉirkaŭ la golfeto.

En la haveno de Larros, la urbestriro elektas la regionan ostromalferm-ĉampionon sed la ostroj venas de Marennes, ĉar nune niaj ostroj ne estas vendeblaj pro algoj. Multaj turistoj promenas inter malfermitaj kabanoj profite al artistoj. Mi parolas pri la ostrobredado dum la promenado ĝis la kruco de la ĝetkapo. Estas jam la tagmanĝa horo. Ni iras al La Hume, kie, apud la restoracio, atendas Violeta, nia plej nova lernantino.



Post la tagmanĝo, pluvas iomete; malgraŭ la vetero ni veturas ĝis la parko de la Duno. Laŭlonge de la duno-vojo, Miguel kaj ni turistoj meze de kelkaj butiketoj. Piede de la duno, ni suprengrimpas la ŝtuparon, kaj post tiu peno, alvenas supre de la duno. Kiom da homoj sur la duno! De tie estas granda vido al la arbarego, la sablaĵo Arguin, la Kabo Ferret kaj la marbordo ĝis Mouleau de Arkaŝono. Miguel ne ŝatas esti proksime al la deklivo. La malsupreniro

estas pli facila. Fine, jen estas la plaĝo, la tajdo estas alta. Li vidas kelkajn blokaŭsojn ne ankoraŭ mergitajn. Supre, ni eniris en la ĝardenon de la hotelo La Corniche.

Poste ni veturas ĝis Le Mouleau, kvartalo de la printempa urbo de Arkaŝono. Fronte al la preĝejo Notre-Dame des Passes, okazas geedziĝo kun siaj gastoj. Post la vizito de la preĝejo, ni promenas ĝis la ĝeto: de tie bela vido al la duno kaj la plaĝo; fronte, la Kabo Ferret. Estas la momento reveni. Herminia kun Pedro alvenas hejme. Ni pasigas agrablan vesperon ĉe la tablo. Kiam Herminia kaj Pedro foriras, ni ludas per Metamorfozo. Miguel ŝatas la ludon.



Dimanĉon, la 1an de Junio

Kun Elvezio ni aŭte veturas ĝis la Maŭra Parko, sur la altaĵo de Arkaŝono. Ni vidas kelkajn tipajn domojn de la vintra urbo, supreniras la belvederon Ste Anne, de tie estas granda panoramo al Arkaŝono.

De la parko ni malsupreniras ĝis la nova urbocentro, ni trapasas la bazaron, ni piediras ĝis la ĝeto Thiers. Ni reiras al la domo de Pedro kaj Herminia por la tagmanĝo. Tie jam atendas Christianne kaj Jacqueline, du esperantistinoj.

Post nelonge alvenas Eric, luksemburga esperantisto, kaj lia edzino Pascale (esperantistaj geamikoj de 10 jaroj de Herminia kaj ŝia patro). Ĉe la tablo, ni parolas esperanton, kaj ankaŭ la hispanan lingvon. Post la manĝo, Miguel al ni vidigas filmon kun fotoj de Kubo, kaj paroladas pri Kubo.



Pli malfrue ni reiras hejmen, Miguel laboras per mia komputilo por elekti fotojn. Anstataŭ promeni, li preferas rigardi la filmon *Esperanto* de Dominique Gautier, en kiu li vidas sian filon.

Lundon, la 2an de junio

Antaŭ la foriro trajne, ni iras por lasta fojo al la haveno de Larros. La du tagoj plezure pasis ankaŭ dank'al la partopreno de Elvezio.

Bernard V.



Ĉu vi pensis pri viaj kotizoj por la jaro 2014? Certe kelkaj forgesis. Ne gravas, tamen mi memorigas la tarifojn al vi:

ESPERANTO-GIRONDE: 17 € por unu persono – 23 € por paro

SAT-AMIKARO: 35 € por kotizo kaj abono – 14 € por kotizo sen abono

Bonvolu kontroli kaj demandi min se vi havas dubon.

Dankojn de la kasistino,

Monique

MIGUEL ÁNGEL EN MONTENDRO

Post lia alveno en Bordoza la 29an de majo, lia restado en Le Haillan, poste en Gujan-Mestras, kaj en Sablons, la programo de Miguel Ángel venigis lin en Montendron.

Merkredon, la 4an de junio, Joël alvenas kun Miguel en la iama lernejo iĝinta la Kultura Centro de Montendre. Estas la 10a en la mateno, ili alvenas de Sablons, kie Joël gastigis Miguel-on ĝis tiu dato.

La tago estos longa labortago por Miguel: tri taskoj lin atendas, de la mateno ĝis la nokto!

Unue, nun ĉeestas pluraj anoj de MEG (Montendre Esperanto Grupo), precize en tiu kulturcentra salono, kie ĉiumarde okazas niaj esperantaj renkontoj: salono Zamenhof. Ni kaptas la okazon por iom konatiĝi kun Miguel Ángel, kaj venas niaj unuaj demandoj. La antaŭan semajnon, ni zorge preparis demandojn farotajn al li... sed ni faras eĉ ne la duonon el tiuj, kiujn ni preparis, ĉar plej detale Miguel respondas niajn demandojn pri la nuna vivo en Kubo: agrikulturo, ĉiutaga vivo, eduk- kaj san-sistemoj... Post la fino de la kurso, ni veturigas lin (kaj liajn tri valizojn!) ĝis nia hejmo kaj ni kune tagmanĝas. Li ne emas al aperitivo, sed tintigas sian oranĝsukan glason kun niaj, kiuj entenas Pineau-vinon, por festi lian restadon en Montendre, kaj bonvolas iomete gustumi la lokan Pineau-vinon.



Post la tagmanĝo, ni vizitigas al li la vidindaĵojn de nia urbo: la protestantan templon, la postrestaĵojn de la kastelo de La Rochefoucauld, la 19a-jarcentan vendo-halon kun ties ĉarpento en formo de inversita ŝipo, kie vidiĝas konstanta ekspozicio de verkoj de manmetiistoj, kaj kiu dumsomere ŝirmas la turismoficejon. Ni rapidu, ĉar jam estas la horo de la dua tasko: renkonto kun la plenkreskulaj lernantoj de la kurso pri la hispana lingvo. Kun granda sindonemo, sed ankaŭ kun videbla plezuro, Miguel bonvolas prezenti en sia gepatra lingvo tion, kion li jam prezentis en Esperanto ĉimatene. Interesa dialogo estiĝas inter unuflanke la instruistino kaj kelkaj lernantoj, kaj duaflanke Miguel.

La tria tasko estas la vespera prelego.

Ekde kiam ni sciis pri la veno de Miguel en Montendron, ni proponis enŝovi prelegon lian en la programon de la Tutmonda Festivalo de la Tero, kiu ĉijare en Montendro, disvolviĝas laŭ tuta monato (de fine de majo ĝis fine de junio). Tial la prelego estas anoncita en la programo de la Festivalo. Ni titoligis ĝin:

«Kubo nun: inter legendo kaj realeco, inter tradicio kaj moderneco, inter revolucio kaj evoluo» (la vortludo estas iom pli trafa en la franca: «entre révolution et évolution»!).

Samtempe la montendra mediateko organizis elmontron de libroj pri Kubo kaj pri Esperanto.

Je la 8a kaj duono, la urba salono estas instalita por akcepti aŭskultontojn, kaj vigla elkomputila kuba muziko ĝojigas tiujn, kiuj sidas. Ni prezentas Miguel-on al la ĉeestantaro (dudeko da personoj), substrekante la gravecon de Esperanto en



tiu evento, kaj Miguel startigas la lumbildaron pri Kubo, kiun akompanas diversaj kubaj muzikoj. Foje, li haltigas la sinsekvon de bildoj, kaj tio ebligas la ĉeestantojn fari al li demandojn, ĉu pri tio, kion ili ĵus vidis, ĉu pli ĝenerale pri la nuna vivo en Kubo. La demandoj estas liberaj kaj senĝenaj, kaj la respondoj de Miguel, same liberaj kaj senĝenaj, ofte restarigas veron pri aferoj, kiujn malbone konis la ĉeestantoj. Ĉiuj ŝatas tiun

manieron agi, kiu estas pli vivplena ol laŭkutima prelego. Estiĝas vera interŝanĝo, dank'al tuja traduko far Yannick kaj Janine... Iom post iom multobliĝas la demandoj, kaj ni vidas, ke plurfoje la traduko al la franca povus esti nenecesa (kaj pri tio la ĉeestantoj mem miras!). Du ĵurnalistinoj faras fotojn kaj verkas raportetojn publikigotajn (1).

Post la fino de la prelego, pluraj restas por komenti la okazaĵon, kiu multe plaĉis. Ni esperu, ke ĝi instigos kelkajn vojaĝi al Kubo, aŭ eĉ ekscii iom pli pri Esperanto!

Post ripoziga nokto, Miguel havas la okazon viziti la ĉiujauĉdan stratbazaron, kiu okupas la tutan centron de la urbo, kaj promeni ĉirkaŭ la lago. Li ĝuas la kvietigan pejzaĝon, kaj tiel akiras novajn fortojn por la posttagmeza programo. Ni kune veturas al Blajo, kaj ni havas la bonŝancon viziti la citadelon en bela kaj varma vetero. Ni interne ĉirkaŭiras la muregojn kaj Miguel parolas pri samstila citadelo en Havano. Estas bela vido al la ĉirkaŭaĵoj, al la estuaro, al la insuloj kaj al la alia bordo.



Post la vizito, ni meritas malvarmetajn trinkaĵojn, do ni ĝuas ilin je la teraso de la Trinkejo de la Haveno. Antaŭ ol foriri, ni iras al la akvobordo por vidi pli proksime la enŝipiĝejon.

Revene al nia veturilo, ni preterpasas virinon, bankostume vestitan, kiu, antaŭ sia loĝveturilo, profitas tiun unuan varman junian tagon kaj pigre-okulferme kuŝas sur plaĝoseĝo fronte al la suno.

Tiel finiĝas la restado de Miguel en Montendro. La sekvan matenon, ni veturigas lin ĝis Angoulême, kie li enrajniĝas, kun siaj tri valizoj, al Parizo. Ni ne maltrankvilas, ĉar ni scias, ke bonkora fervojistino lin atendas en Montparnasse stacidomo, por helpi lin ĝis Norda stacidomo, kie li enrajniĝos al Amiens, por ses-taga restado.

Tre bonajn memoraĵojn ni konservas pri tiu renkonto kun Miguel, kaj ni esperas, ke lia plua restado en Eŭropo estis same plezura!

(1) Efektive, la du artikoloj estis publikigitaj, la unua en *Sud Ouest*, mardon la 10an de junio, kaj la dua en *La Haute Saintonge*, vendredon la 13an de junio.

Janine



MIGUEL ÁNGEL EN LE HAILLAN

Post 8 jaroj, duan fojon oni parolis pri Esperanto en Le Haillan. Kadre de lia eŭropa turneo, ni akceptis Miguel Ángel GONZÁLEZ ALFONSO-n, kuban esperantiston (kaj eksan instruiston pri la angla, neniu surprizo) venintan el Limoges kaj antaŭ lia foriro ĝis Gujan-Mestras. Li ja estis en la anoncita trajno, kaj li ne forgesis eliri el ĝi en la bordoza stacidomo!

La prelego temis pri «Kubo en la 21a jarcento». Mi petis de la asocio **France-Cuba**, kies ĝirondia sidejo estas en Le Haillan, la eblecon kunorganizi la eventon. Tio bone funkciis kaj la prelego, fakte la demandoj, estis faritaj jen en la hispana, jen en Esperanto.

Ne multe da ĉeestintoj ĉar estis feria tago, sed la nura ebla tago por disponi pri publika salono. Sufiĉe da demandoj de tre interesitaj partoprenantoj.

Tuj post la kutima *mojito*, ni iris vespermanĝi ĉe la kajoj de Garono por montri la luman noktan etoson.

La sekvontan tagon, ni vizitis Le Haillan, eĉ la trejnocentron de la bordoza futbalklubo kaj, posttagmeze Bordozone: la laborborson, la placon de la Victoire, la akvitanian muzeon kaj la sinagogon. Post la urbodomo kaj la katedralo, ni uzis la tramon ĝis la monumento al Ĝirondistoj kaj ni revenis al la Granda Teatro por piediri ĝis la placo Gambetta por foti maskeronojn.

Ni iomete lacias do ni enbusiĝis por reveni hejmen.

Bernardo

LA KOMPANOJ INVITAS VIN AL
KANZONO-STAĜO



Maison Promotion
Sociale Artigues-près-
Bordeaux

Sabaton 11an kaj
dimanĉon 12an de
oktobro 2014

Kiam restas am' nur

MINA
MOND'

Estas ĝoj' !

VOLAS MI !

LA SENLIMA ESPER'

La dizertonto

ES



Sub impulso de **FaMo** kaj **Marcelo**
laŭ ekzemploj de la parizaj Bachiques Bouzouks kaj madridaj indignuloj

La nord-irlanda

Dormu karuleto !

balado !

Majorana

Tuj la Kompanar'

LILI

Kiam regos am' sur ter'

STAS FESTO !

La Kompanoj preparas surstratan kunkantadon. Dum la UK 2015 estos proponite al la Lilla publiko kunkanti famajn francajn kanzonojn tradukitajn en esperanto.

Esperanto-Gironde invitas vin al provkantado kaj selektado de la kantoj dum speciala semajnfino. Sabaton 11an kaj dimanĉon 12an de oktobro en la MPS (Maison de la Promotion Sociale) en Artigues-près-Bordeaux, akompanate de FaMo (akordiono), Bernard Legeay (subasofono) kaj Isabelle Diaz (piano kaj akordiono).

La partoprenontoj ricevos kanzonaron kun la partituroj kaj la tekstoj por unuvoĉa interpretado de speciale tradukitaj kanzonoj de Brel, Perret, Belle, Renaud, Fugain, Bachelet, Telephone, Zaz, sed ankaŭ Vian, Lemarque, Trenet, Béart, Bourvil... kaj kompreneble Brassens !

NE MALTRAFU
TIUN EVENTON
POR AMUZIĜI !



Pliaj informoj ĉe : marcel.redoulez@wanadoo.fr

Aliĝkotiĝo (inkluzive kanton kun partituroj).....15€

Eblas rezervi manĝon en la MPS (antaŭ la 20a de septembro) por sabato vespere kaj dimanĉo tagmeze po 11,50€

Kelkaj tranokteblecoj disponeblas ĉe lokaj esperantistoj aŭ simpatiantoj; ilin bonvolu peti antaŭ la 20a de septembro; se ne, hoteloj proksimas.

Venu por kanti kun La Kompanoj



Tiel ke ni preparu sufiĉan nombron da kanzonaroj kun partituroj, bonvolu perrete aŭ telefone informi nin pri via intenco partopreni en tiu speciala esperanto- kanto-staĝo kun viaj eventualaj manĝorezervoj ĉe marcel.redoulez@wanadoo.fr T. 05 56 21 38 64. Dankon. Vi pagos surloke al Monique, nia kara kasistino.



2014: Dinano

La 87a kongreso de SAT okazos de la 9a ĝis la 16a de aŭgusto 2014 en Dinano (Francio).

La temo de la kongreso :

"Civitanoj loke agadas por konstrui ontecon"

Pliaj informoj aperos regule iom post iom en tiu retejo.

Por kontakti la Organizan Kongres-Komitaton:

- **Helikpoŝte: SAT-Kongreso 2014, Chez Odile Lemarchand,**

La Ricollais, FR - 22630 EVRAN

- **Retpoŝte: satdinan2014@gmail.com**

- **Telefone al Franjo: (+33) (0)7 81 90 75 43**



STAĜOJ



Aŭgusto 01a-09a: Sennacieca semajno alternativa

Cseh-kurso, paroliga kurso, korea natura kuracado, rusa pentrarto, sur-realismo, kubismo, teatro, skeĉoj, prelegoj pri diversaj temoj, ekskursoj al vidindaĵoj. Gvidos Junĉjo (Songyun Lee), L. Vazquez, N. Korĵenevs-

kaja, B. Schumann, J.-L. Kristos .

2014-aŭg-09/17 Festa Semajno por infanoj kaj familioj

Fari pupojn, trezor-serĉado kaj gimnastiko, fari manlaborojn, E-kurso, Cseh-kurso, bano en lagoj, koncerto kaj folk-bala dancado. Gvidos N. Janssen, L. Vazquez, N. Dubrulle, J.-L. Kristos, Kapriol', B. Schumann.

M.C.E. Château de Grésillon, St. Martin d'Arcé 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU

Tel.: 02 41 89 10 34 (aŭ 09 51 64 10 34) - Informoj: gresillon.org



Julio 7a-11a: Praktikado de la lingvo plurnivela

Koncernas komencantojn, progresantojn (2a grado kaj pli...); trejnado pri instruado de Esperanto al komencantoj (eblos prepariĝi por la pedagogia specialiĝo de la ekzamenoj de FEI)... Studado en etaj grupoj, adaptita pedagogio, familia etoso. Familioj kun infanoj bonvenaj. Gvidos A.-S. Markov.

Aŭgusto 11a-15a: Promeni tra naturo kaj Vikipedio

Tiu staĝo havos du aspektojn : Ni promenos en naturo kaj malkovros speciojn de vivoj: plantoj, fungoj, bestoj, kaj ankaŭ interesajn mediojn. Ni verkos artikolojn por Vikipedio pri la sama temo, studante la jam ekzistantajn – kiujn eventuale oni ankaŭ provos plibonigi. Venu do bone ekipite – ŝue, vestaĵe, kaj se eble komputile.

Tiu staĝo taŭgas ankaŭ por prepariĝi al la faka branĉo "Sciencoj kaj Tekniko" de la Atesto pri Kapableco de FEI. Gvidos Alain Favre.

KVINPETALO Esperanto-Centro, 4 rue du Bureau 86410 BOURESSE

Tel.: 05 49 03 43 14 (aŭ 06 07 31 67 81) - Informoj: kvinpetalo.org



Kiel Renardo eniris la biendomon de Constant Desnois; kiel li forportis la virkokon Klarkant', kaj kiel li ne manĝis lin (daŭrigo)

Klarkant', terurigita, ektemas kaj vekigās. — Sankta Spirito, li diris, sin krucosignante, defendu mian korpon kontraŭ morto kaj mallibereco! Li saltas de la tegmento kaj reiras inter la kokinojn disajn sub la veproj de la heĝo. Li vokas Buntan, ŝi alvenas.

— Mia kara Bunta, mi konfesas al vi, miavice mi maltrankviliĝas.

— Vi volas moki nin, ŝajne, respondas la kokino, vi aspektas kiel hundo, kiu krias antaŭ ol ŝtono trafas ĝin. Ni vidu! Kio okazis al vi?

— Mi ĵus havis strangan sonĝon, kaj vi tuj diros al mi vian opinion pri ĝi. Mi kredis, ke venis al mi io, mi ne scias kion, surhavanta rufan peltaĵon, bele tajlitan, sen tondomarko. Mi estis devigata min vestaĉi per ĝi. La bordero havis la blankecon kaj malmolecon de eburo; la hararo estis ekstere; oni surmetis ĝin al mi inverse, kaj dum mi provis liberigi min de ĝi, mi ektemis kaj vekigās. Diru al mi, vi prudenta, kion opinii pri tio.

— Nu, serioze diras Bunta, ĉio tio estas nur sonĝo, kaj laŭdire ĉiu sonĝo estas mensogo. Tamen, mi pensas diveni kion la via povas antaŭsigni. La objekto surhavanta rufan peltaĵon estas nenio alia ol la vulpo, kiu volos vestaĉi vin per ĝi. Pri la bordero simila al eburaj grajnoj, mi rekonas la blankajn dentojn kies malmolecon vi baldaŭ sentos. La tre mallarĝa kolumo estas la gorgo de la malica besto; tra ĝi vi pasos kaj povos tuŝi per via kapo la voston, kies hararo estos ekstere. Jen la senco de via sonĝo; kaj ĉio tio probable okazos antaŭ tagmezo. Do, ne atendu, kredu min; ni tuj forfuĝu, ĉar, mi ripetas, li estas tie, en tiu vepro, gvatante la momenton formordi vin.

Sed Klarkant', plene vekita, estas retrovinta sian antaŭan memfidon.

— Bunta, mia kara, li diras, jen kelkaj el viaj teruroj, jen via kutima mal-kuraĝo. Kiel vi povas supozi, ke mi mem lasos min kapti de besto kaŝita en nia korto! Vere vi estas freneza, kaj ja freneza estas tiu, kiu teruriĝas pro sonĝo.

— Do, diras Bunta, estos tiel, kiel Dio volos: sed mi ne plu akceptu vian favoron, se la sonĝo, kiun vi rakontis al mi, postulas alian klarigon.

— Nu, nu, beleta mia, pavante diras Klarkant, nun sufiĉe da klukado.

Kaj li reiras al la sterkamaso, kiun li plezure gratetis. Iom poste, denove dormo fermis liajn okulojn.

Sed Renardo perdis nenion el la parolado inter Klarkant' kaj Bunta. Li kontente vidis la memfidon de la koko, kaj kiam li opiniis lin profunde redormanta, li ekmovis, silente metis piedon antaŭ la alia, poste li unusalte impetis por formordi lin. Sed kiel ajn silente li alproksimiĝis, Klarkant' antaŭsentis lin, havis tempon por salti kaj eviti trafon, flugante aliflanken de la sterkamaso. Renardo ĉagrene konstatas, ke li malsukcesis, kaj nun, kiu rimedo por reteni la predon, kiu eskapas?

(daŭrigota)



Desegnita de Morin'

Tiu rakonto el la *Romano de Renardo* pensigis min pri fabelo de La Fontaine (kiu verŝajne pli malpli inspiriĝis el iu tia rakonto): *Le Coq et le Renard* (II,16).

LE COQ ET LE RENARD

Sur la branche d'un arbre était en sentinelle
Un vieux Coq adroit et matois.
- Frère, dit un Renard, adoucissant sa voix,
Nous ne sommes plus en querelle :
Paix générale cette fois.
Je viens te l'annoncer ; descends, que je t'embrasse.
Ne me retarde point, de grâce ;
Je dois faire aujourd'hui vingt postes sans manquer.
Les tiens et toi pouvez vaquer
Sans nulle crainte à vos affaires ;
Nous vous y servirons en frères.
Faites-en les feux dès ce soir.
Et cependant viens recevoir
Le baiser d'amour fraternelle.
- Ami, reprit le coq, je ne pouvais jamais
Apprendre une plus douce et meilleure nouvelle
Que celle
De cette paix ;
Et ce m'est une double joie
De la tenir de toi. Je vois deux Lévrier,
Qui, je m'assure, sont courriers
Que pour ce sujet on envoie.
Ils vont vite, et seront dans un moment à nous.
Je descends ; nous pourrons nous entre-baiser tous.
- Adieu, dit le Renard, ma traite est longue à faire :
Nous nous réjouissons du succès de l'affaire
Une autre fois. Le galand aussitôt
Tire ses grègues, gagne au haut,
Mal content de son stratagème ;
Et notre vieux Coq en soi-même
Se mit à rire de sa peur ;
Car c'est double plaisir de tromper le trompeur.

LA KOKO KAJ LA VULPO

Sur arba branĉo sidis por gvati sen perturbo
Maljuna kaj ruza Virkoko.
- Ho! frato, mildvoĉis la Vulpo,
Kverel' ne plu estu ĉi-loke:
Ni vivu en paco sen kulpo.
Anoncas mi kun ĝojo; sobiĝu vi por kiso.
Rapidu, je Di', sen malico;
Trakuri plu mi devas dek leŭgojn ĝis landlimo.
Vi povas prizorgi sen timo
Pri viaj aferoj nedrame;
Ni frate vin helpos kun amo.
Vi tial vin lasu al festo.
Kaj tuje vi sobu el nesto
Al frata kaj ama bonkiso.
- Amiko, diris Koko, neniam aŭdis mi
Novaĵon tiel bonan, pli mildan, ĝojan pli
Ol tiun
Pri tiu paco.
Kaj ĝojo duobla, jen plaĉo,
De vi ĝin havi. Vidu, Ĉashundoj du alvenas,
Tutcerte pri paco bukĉenas
Por tiu novaĵo al ni.
Rapidas ili, baldaŭ ĉe ni kunestos ili.
Sobiĝas mi nun haste por interkis' kun vi.
- Adiaŭ, diris Vulpo, tro longas voj' por mi:
Festados ĉi sukceson ni kune ĝoje iam
Tuj sen prokrasto la vulpo eksprese
Forkuras rapide-necese,
Ĉagrena pro fuŝa manovro.
La olda Virkok' kun memgloro
Ekridis pri vulp-malaplombo;
Duobla ĝoj' ja estas trompulon bele trompi.

*Esperantigis Janine
(Dankon al Marcelo pro liaj sugestoj)*

ESTRARO
de
« ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale:
347771 F Bordeaux

* * * * *

Prezidanto: **Bernard SARLANDIE**

24, rue des Bosquets de Venteille
33185 LE HAILLAN

Tel: 06 83 29 40 13 / bernard.sarlandie@gmail.com

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

Help-sekretariino: **Morine STRIDE**

Kasistino: **Monique DUSSENTY**

76 avenue La Fontaine

33560 CARBON BLANC

Tel : 05 56 06 74 49 / monique.duss@free.fr

* * * * *

Materialon por LEGI bv. sendi al la sekretariino aŭ al:
Yannick DUMOULIN —> yannickdum@free.fr

